




AVIGNON ESPERANTO

Sendependa Ligilo de la KULTURA ESPERANTO-CENTRO de AVIGNON

N° 49

Oktobro 2010

Aperas : oktobre, decembre, marte, majo.

Retadreso : esperanto-avignon@laposte.net

REDAKTANTOJ :

Rose-Marie Quintin, Francis Briuelle, Jean Royer, Jeannine Collet

Abono al tiu gazeto :

minimume 5 €

Plenskribu la ĉekon al :

« Cercle Culturel d'Espéranto d'Avignon »

Poŝta konto 6674 07 G - Marseille.

Sendu ĝin al :

Jean-Pierre SCHNEIDER

Estrancoze, route des Carrières,

FR - 13570 Barbentane

Sendu viajn mesaĝojn, informojn, artikolojn, kritikojn al :

Michel Cerisay, 15 place des vents provençaux, FR - 13140 Miramas.

Retadreso : michel.cerisay@sfr.fr

Aliĝo al la klubo : 20 €. Tiu kotizo inkludas la abonon al la gazeto.

PER LA ANGLA LINGVO LA KULTURO IĜAS ANGLA-USONA
PER ESPERANTO ĜI IĜAS UNIVERSALA !

NEKROLOGO

Michèle Portigliati informas nin pri la forpaso de **Jane Delorme** en sia okdeknaŭa jaro.

Jane estis nelacigebla motoro de la gupo el Carpentras.

Ŝi regule partoprenis en la literatura kurso en Avignon.

La klubanoj de la Esperantista Kultur-Centro de Avinjono, profunde tristaj kompatas kaj kondolencas lian familion.

Honoro al la veteranino de nia Klubo

SinJORino Simone Humm

Ŝi estas 90 jaraĝa (ne gravas la ĝusta tago). Kiam vi ricevos tiun bultenon, ĉu eblas, ke vi sendu al Simone poŝtkarton de via urbo aŭ vilaĝo aŭ alia loko ?

Estus bone, ke vi instigu kelkajn el viaj amikoj fari same. Ne gravas, se ŝi ne konis tiujn Mikaelo, Annie, Ludoviko, Johanino... kiuj subskribos la poŝtkartojn. Ŝi ne plu povas vojaĝi, ŝi paŝas malfacile ; do, estos alia maniero vojaĝi. La celo estas, ke ŝi ricevu almenaŭ centon da poŝtkartoj. Ne gravas, se vi ne konas Simone Humm, se vi neniam legis la artikolojn, kiujn ŝi skribis. La surprizo, ricevi multajn poŝtkartojn, estos sunradio en ŝia monotona vivo. Dank'al vi ŝi revos tagon post tago.

Eksinstruistino, ĉu eblas resumi la ampleksan laboron de Simone Humm pri kulturo, pri instruado france kaj Esperante ? Dum pli ol tridek jaroj, kadre de la zamenhofa tago en Avinjono, ŝi ofte prezentis prelegojn al ni, helpata de sia edzo por la diapozitivaj. SinJORino Humm instruis Esperanton, koresponde, al fervojistoj kaj al multaj aliaj scivolemuloj de tiu lingvo. Ŝi partoprenis en diversaj kongresoj: internaciaj, naciaj aŭ regionaj kaj mem prizorgis plurajn el ili, ĉiam agema kaj sindonema. Ne eblas nombri la artikolojn, kiujn Simone skribis en nia gazeto kaj en aliaj.



Dank'al Esperanto ŝi havis amikojn, korespondantojn en la tuta mondo. Dum multaj jaroj, tre simple, ŝi "portis la torĉon" de Esperanto.

Hodiaŭ ni deziras montri al ŝi nian altan estimon kaj diras:

DANKON SINJORINO SIMONE HUMM.

La Avinjonaj klubanoj

P.S. Por ke la surprizo estu plena, nur malfrue, kiam ŝi estos ricevinta dekojn da poŝtkartoj, ni donos al ŝi tiun bultenon.

Adreso : SinJORino Simone HUMM
maison de retraite Van Gogh
380 rue René Cassin
FR - 84000 AVIGNON

Romaneto, sekvo

Tiam, soldato aproksimiĝis rapidege al la ĉefoficiro, flustris kelkajn vortojn kaj sen atendi respondon, foriris. La ĉefoficiro kuntiris la brovojn kaj kun senkuraĝigita mieno delasis siajn brakojn fali. Li grumblis:

– Sesjara infano ! Sesjara ! Nekredeble.

Turnante la vizaĝon al la Palastroj, li aldonis :

– Venu ! Ĉi-vespere vi estos liberaj.

Post kelkaj horoj ni estos for. Ni reiru al la domo.

Eŭfrazia, Luko, Adela kaj Johana maltrankvile sekvis lin. Ili ne kuraĝis demandi la ĉefoficiron pri la signifo de la vortoj : « sesjara infano ! ». Demandoj kirliĝis en iliaj kapoj. Iliaj buŝoj estis sekaj. Baldaŭ ili estus liberaj ! Ĉu vere ?

Ili trairis la korton. La serĝento estis parolanta telefone kun korespondanto, al kiu li ordonis « Sendu tuj la ŝarĝaŭton kaj la grandan remorkon. Ni retiras nin tuj ». Partigitaj inter timo kaj espero, la Palastroj rigardis unu la alian. Post la ĉefoficiro ili eniris en la domon. Ĉirkaŭ la longa tablo el malhela kverko jam sidis Sara kaj Luiza. Ili ridetis dum la aliaj sidiĝis.

La ĉefoficiro rigardis ilin. Li duonridetis, gratis al si la mentonon kaj deklaris :

– Ne timu, ĉio en ordo. Antaŭ ol respondi al viaj demandoj mi precizigos kelkajn punktojn.

–

La ĵurnalistino, al kiu via filineto parolis, certe ne povis publiki fotojn, sed ŝi havis poŝkasedilon, kiun Sara ne vidis. Ŝi registris la konversacion kaj telefone persvadis lokan radiostacion tuj dissendi ĝin, aldonante komenton. Televida bulteno reprenis la informon. Fine, la sekreto estis malkovrita.

– Sed kion vi celis ? demandis Johana.

– La defenda ministerio deziris scii, kiom da tempo eblas konservi mision sekreta. Ni elektis bienon, kiun oni povis izoli facile, kies loĝantoj ni povis facile kontroli, sed la manko devenis de infano. Tiuj anĝeloj estas, vole aŭ nevole, pli ruzaj ol ni imagas ...

– Ho ! protestis Adela, vi ne rajtas diri tion; mia filineto

– Trankviliĝu. Via filineto faris tion tute senintence, naive. Mi tute ne koleras. Vidu, ŝi ridetas. Ŝi ŝerctrompis niajn plej bonajn strategiistojn. Ili subtaksis la naturan scivolemon de filineto.

Luko interrompis la ĉefoficiron:

– - Vi parolas pri sekreta misio sed kial vi ne elektis dezertan lokon, for de ĉiuj loĝejoj ?

– - La eksperimento devis okazi en medio kiel eble plej ordinara.

– - Sed kial nia bieno ? Ĉu ne estas aliaj izolitaj bienoj en nia lando ?

– - Jes, sed nur via bieno estis apud aŭtovojo kaj almenaŭ kvar kilometrojn for de la vilaĝo.

– - Do, la alveno de nifo ne estas hazardo ?

– - Kaj la verdaj koloroj ? La spuroj en la domo ?

– - La ŝafoj ...?

– - La virŝafo kaj la fotilo ...?

– - La verda nubo ...?

– - La okuloj de Sara ! Kial vi endanĝerigis ŝin ?

– - Ne parolu ĉiuj samtempe se vi volas, ke mi klarigu al vi, kion vi rajtas scii. Do, aŭskultu !

–

La nifo estas telekondukita prototipo, kiun la armeo testis en ordinara situacio. Antaŭ ol sendi ĝin, generalo pentrigis la internon de la kupolo per speciala farbo, kiu fariĝas verda post du horoj ĉar ni scias, ke fremdaj spionoj volas foti la internon de tiu « aviadilo ». Pro tio, ni ankaŭ konstruigis murojn. Vi vidis kvazaŭ verdajn pordetojn en la muro, kiu ĉirkaŭas la bienon. Tion ni faris intence por timigi vin, ke vi ne provu proksimiĝi al la « nifo ». La masonistoj estas soldatoj. Ili ne devis montri sian miron. La betonbrikoj havis numeron, por ke la masonistoj tre rapide konstruu la muron laŭ la antaŭvidita maniero.

Pri la verda koloro interne de la domo, estas tre simple. Dum via foresto lastan semajnon, tri soldatoj vizitis vian domon kaj sprajis likvon sur la murojn; ĝi sekiĝis post kelkaj minutoj kaj fariĝis tute ne videbla. Hodiaŭ, tra la kamentubo, ni blovis gason ; ĝi faris reakcion kun la likvo sprajita sur la muroj kelkajn tagojn antaŭe.

– - Sed vi povis nin veneni! ekkriis Luiza.

Tute ne, tion la saninstancoj kontrolis dum 20 jaroj. Nenia problemo estis malkovrita, eĉ kiam temas pri tre junaj infanoj.


Sekvota...

PIKNIKO 2010

Okaze de nia pikniko, la 17an de junio, ni renduevis en la sidejo de la asocio pri Valdanoj en Merindol. Kun granda intereso, atentemaj, ni aŭskultis la respondeculon, kiu priskribis la historion de sinjoro Valdo (Valdès aŭ Vaudès) fondinto de la valdanismo. Ili nomiĝis : "La malriĉuloj de Liono". Ili vivis en paco en tiu regiono, kiel kamplaboristoj dum pluraj jaroj. En 1545, granda masakro okazis en la tuta regiono, ĉefe en "Cabrières d'Avignon" (Kabrier' d'Avinjono), kie pli ol 900 loĝantoj estis murditaj dum semajnfino.

La historion de la movado en la regiono de Luberon, ni publikos en nia gazeto.

Rose-Marie



Koncize

Monata kunveno : 24an de novembro

Zamenhofa tago : 12 an de decembro

Ferioj : 23an kaj 30 an de decembro

Reĝkuko kaj monata kunveno : 13 an de januaro 2011

Pikniko : 26an de junio, Barbentane

ZAMENHOFA TAGO 2010

Okazos la 12an de decembro 2010, **Daniel MOIRAND**, prelegos pri :

"*La mil kaj unu noktoj*", tradukis de la araba al la franca lingvo, unue Antoine Galland (6-4-1866 : 17-9-1917), due Joseph Charles Mardrus. La tradukon de Antoine Galland esperantigis Daniel Moirand. Pri tiu verko li prelegos.

La libro "*la mil kaj unu noktoj*" estos publiĝota, sed ...kiam ? Tion ni ne povas prognozi.

32a ZAMENHOFA TAGO EN AVIGNON

Dimanĉon la 12an de decembro 2010

Ĝi okazos en « Souvine » sude de Avignon. (vidi planon). Vi povos alveni per buso n° 3 D (Pordo « Saint Michel ». Elbusiĝi ĉe la haltejo « Souvine » aŭ per trajno. Tiu okaze antaŭ avertu ... Ni akceptos vin ĉe la stacidomo (precizigi la nomon de la stacidomo) kaj akompanos vin al la « Souvine », loko de nia kunveno.

Jen la programo :


- 9a : akcepto de la partoprenantoj,
- 10a : prelego de **Daniel MOIRAND**, pri la temo :

" La mil kaj unu noktoj "

- posttagmeze, je la 14a kaj duono, la grupanoj de nia asocio prezentos **skeĉojn, poemojn, rakontojn, kantojn Tiuj, kiuj deziras prezenti ian teatraĵon, estos tre bone akceptataj. Bonvolu interrilatiĝi kun F. Briulle precizigante la naturon kaj la daŭron de via interveno. Antaŭdankon.**

Jam aliĝis : Francis BRIEULLE, Monique kaj Michel CERISAY, Bernadette DESCHANEL, Hélène kaj André GENTE, Rose-Marie QUINTIN, Jean ROYER, Françoise kaj Jean-Pierre SCHNEIDER, Josette BOURGEOIS...

Por FACILIGI la organizadon, ALIĜU TUJ ! DANKON !



Aliĝilo al la 32a Zamenhofa Tago en Avignon (12-12-2010)

NOMO : Antaŭnomo :

Adreso : Te :

Aliĝkotizo : 6 € *..... = ... (ĉi jare ni devas pagi la luadon de la kunven-ĉambro)

Tagmanĝo : 16 € *..... = ... vegeterano : jes aŭ ne.

Sumo : = ...

La ĉekon : « Cercle Culturel d'Espéranto - Avignon » (Poŝta konto : 66 74 07 G Marseille) kaj la aliĝilon sendu al la kasisto :
Jean-Pierre SCHNEIDER , Estrancroze, route des Carrières - 13570 - Barbentane.

Cercle Culturel Esperanto d'Avignon
Espace Social et Culturel La Croix des Oiseaux, rue du Tambour d'Arcole, 84000 Avignon

Nom, prénom :

Adresse :

CP-Ville :

Tel(s) :

Adresse courriel :

☐ Adhésion complète 2009-10 (incluant l'abonnement) : 20 €

☐ Abonnement à la gazette (sans adhésion au CCEA) : 5 €

Je désire recevoir la gazette par voie informatique : oui ☐ non ☐

✂.....

Bulletin à retourner à l'adresse ci-dessus accompagné du chèque à l'ordre de « **Esperanto Avignon** ».

Kultura Esperanto-Centro
ESC Croix des Oiseaux
Rue du Tambour d'Arcole
FR - 84000 - AVIGNON